

Tagiĝo 27

*Cirkulero de Esperanto-Junularo en ĈRS.
Eldonas Dŭm osvĕty, odbor Esperanto, Opava – 1955/IV,
adr.: Kuzník, J. Rooseveltova 17, Opava*

Kuraĝe antaŭen!

En Otrokovice, dum la lasta jarkunveno de la ĉs. esperantista junularo, ni rerigardis la aktivecon kiun ni montris dum la jaro ĵus pasinta. Kaj ni devis konstati, ke de post la jarkunveno en 1954 la entuziasmo junulara iom estingiĝis. Montriĝis ioma laco kaj ĝenerale, manko de laborvervo. Aliflanke, kelkaj unuopaj funkciuloj distingiĝis per laŭdinda agemo, precipe la regiona peranto en Brno.

En la sekvanta jaro ni havos la taskon, laŭ la organiza flanko, kompletigi la reton de delegitoj lokaj kaj regionaj kaj, laŭ la flanko de agado, plibonigi la konkurson de la grupoj. La delegitoj devos sisteme raporti pri la agado: la lokaj al la regiona, la regionaj al la ĉefdelegito. Ni bezonas koni precize la aktualan staton de la lokaj grupoj kaj por tiu celo ĉiu grupo ricevos plenigotan demandaron (informliston). La ĝeneralan gvidlinion por nia agado donas al ni la rezolucio de nia nunjara jarkunveno, kiun ĉiu atente legu. Diskuto en via rondeto pri la rezolucio kaj fiksi la metodojn, laŭ kiuj vi plenumos ĉiun unuopan eron.

La fonto de ĉiu agado por idealo, de agado sen materia profito, estas la entuziasmo. La tasko de nia centrejo kaj de la delegitoj estos elvoki la entuziasmon kaj viviĝi la latentajn kreokapablojn en nia esperantista junularo. Kaj kiu ne sentus novan, ĝojoplenan emon al nova laboro, nun, kiam malfermiĝas novaj, promesplenaj perspektivoj por nia agado? En la ĵus pasintaj monatoj kaptis nin sento de ĝoja emocio. Ĉiam novaj sciigoj pri sukcesoj de Esperanto en la popoldemokrataj landoj kaj precipe en Sovetunio, informoj preskaŭ sensaciaj, stimulis nian laborenergion: en Bulgario la esperantista movado revigliĝis kvazaŭ per sorĉa vergo. La poloj atingis konkretajn kaj oficialajn rekonajn. Diversaj sovetaj instancoj montris rilaton tre favoran al Esperanto kaj tio ebligis la fondon de Sovetunia Esperanto-Societo. Grava rekono estis la decido de la Sovetunia Akademio de Sciencoj delegi E. Bokarev al la Tutŝtata Konferenco de Esp-istaj Pacdefendantoj en Otrokovice. En la Lomonosov-universitato en Moskva funkcias de la nova lerneja jaro, Esperanto-rondeto. Komenciĝis pli vigla korespondado kun sovetaj esperantistoj. Ĉeĥoslovakaj cirkuleroj estas tie legataj kun granda intereso kaj oni rekone konstatas, laŭ informo, la "riĉajn spertojn de la ĉs. esp-istoj". La komitato de la Tutmonda Federacio de Demokrata Junularo kaj Studentaro rekonis la valoron de Esperanto. Osvĕtové beseda en Praha radikale ŝanĝis sian sintenon al Esperanto.

Novan, grandan esperon donas al ni la aktuala evoluo en la internacia politika situacio, kiu dank' al la grandskala porpaca batalo sereniĝas. Aperas konturoj de ebleco de multe pli intensa internacia rilatado ol ĝis nun. Ni esperas jam, ke iu el ni povos partopreni en la venonta jaro internacian kongreson. Oni kreas la kondiĉojn, sur kies bazo plenumiĝos la insistaj postuloj de la rezolucioj de la Monda Packonsilantaro. Nia agado plene harmonias kun tiuj rezolucioj kaj akcelas ilian plenumon.

Junaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio! Mi vokas vin: reaktivigu viajn vicajn! Intensigu vian agadon! KURAĜE ANTAŬEN! J. Mařík

Internacia renkontiĝo de esperantistoj en Varsovio

La 6-an de aŭgusto okazis en Varsovio en kadro de Tutmonda festivalo de Junularo kaj gestudentoj ĝojiga renkontiĝo de 120 junaj esperantistoj el 15 landoj: /Polujo, ĈSR, Svedujo, Norvegujo, Danujo, Islando, Okcidenta, Germanujo, Aŭstrujo, Holandio, Francujo, Bulgario, Anglujo kaj aliaj./ Tio estis la unuafoja internacia renkontiĝo en festivalo, en kiu al reciproka interkompreniĝo kaj traktado estis interpretistoj tute superflujaj. Al la kunveno prezidis junaj homoj el tri landoj: John Lynn el Anglujo, Bertil Englund el Svedujo, kiu reprezentis la Mondpacan Esp. movadon kaj polo Tadeusz Michalik.

La renkontiĝon partoprenis la reprezentanto de la Tutmonda Federacio de la Demokrata Junularo kamarado Ashot, kiu raportis, ke TFDJ konas la signifon de Esperanto por interkompreniĝo inter nacioj kaj promesis fari propozicion, kiun donis en sia parolado s-ano Michalski el Polujo - fariĝi Esperanton unu el la ĉefaj lingvoj de la Junularaj Festivaloj - al la Plenuma Komitato de la TFDJ.

La partoprenantojn plue salutis nestoro de polaj esp-istoj dr. Sakowicz kaj reprezentantoj de esperantistoj el ĉiuj popoldemokrataj ŝtatoj kaj el ceteraj partoprenintaj landoj. La ĉeĥoslovakano Esp. Junularon reprezentis s-anino M. Hrubá el Poĉepice. Junaj esperantistoj el Glucholazy - Polujo, preparis por junaj esp-istoj el ĈSR la memorflaĝeton. La renkontiĝon partoprenis ankaŭ dr J.Jermář, membro de ĉeĥoslovaka kultura delegacio en Varsovia festivalo (ekskomitatano de EAĈSR).

Kun varmegaj aplaŭdoj la ĉeestantoj akceptis la radiogramon de la moskovaj gesamideanoj, kiuj ankaŭ proponis fariĝi Esperanton unu el la ĉefaj lingvoj de la Junularaj Festivaloj. El Sovet-Unio kaj el aliaj landoj alvenis krome multaj leteroj kaj telegramoj, inter ili ankaŭ saluto de kamarado E. Bokarev, la scienca laboranto de Soveta akademio de sciencoj en Moskvo kiu sendis saluton en nomo de Soveta Esperanta Asocio.

Tre varmege aplaŭdis la ĉeestantoj la sciigon, ke Sovetlanda Esperantista Asocio jam estas denove organizita kaj ke ĝi jam vivas kaj agas.

Post la kunveno okazis renkontiĝo dum kiu ĉiuj ĉeestantoj ekkantis esperantlingve la himnon de la Tutmonda Federacio de Demokrata Junularo. Ĉiuj estis tre kortuŝitaj kiam unuafoje en la historio de la Festivaloj eksonis esperantlingve la himno de la TFDJ.

Post la renkontiĝo ĉiuj per la aŭtobusoj veturis al la enterigejo, kie troviĝas la tombo de nia majstro Doktoro Lazaro Ludoviko Zamenhof. Post la paroladoj de la reprezentantoj de Pola Esperantista Asocio kaj paroladoj de la eksterlandaj gesamideanoj (inter ili parolis ankaŭ la reprezentanto de ĉeĥoslovaka samideanaro) oni metis sur la tombon la florkronon kaj ekkantis la himnon de esperantistoj "La Espero". Fine okazis la komuna fotografado.

/Laŭ la raportoj de s. Mařík el Praha kaj samideano Jan Rezner el Glucholazy./

La unua tutŝtata konferenco

de Esperantistoj-Pacdefendantoj en ĈSR

En la tagoj de la 7-a ĝis la 10-a de julio 1955 okazis en urbo Otrokovice la I-a Tutŝtata konferenco de Esperantistoj-Pacdefendantoj en Ĉeĥoslovakio. Partoprenis ĝin ente 316 delegitoj el 90 lokoj en nia ŝtato kaj 9 eksterlandaj gastoj (el Aŭstrio, Danujo, Francujo, Svedujo kaj Usono) ĉe tiu okazo estis malfermita ekspozicio "Popoloj de ĉiuj landoj en batalo por konservi la pacon". Ĵaŭde ĝis sabate okazadis multaj prelegoj diverstemaj. Sabate vespere prezentis artisma grupo "Verda ĉaro de Julio Baghy" el Praha artan programon. Sabate posttagmeze je la 16-a horo kunvenis delegitoj de Junulargrupoj en speciala kunsido por pritrakti aferojn de Junulsr-movado en ĈSR. Dimanĉe la 10.7.55 matene estis celebrita katolika meso kun esperantlingva prediko kaj Esperanta solkantoj. Je la 9-a horo estis malfermita ĉefa laborkunsido de la konferenco. Ĉefreferaton prelegis s-ano Burda je la temo "Esperantista pacmovado" kaj a-ano Jos. Vitek: "Esperanto interkomprenilo

de nacioj". Poste alparolis la ĉeestantojn reprezentanto de uzinklubo en kies kadro Esp.-rondeto en Otrokovice laboras, reprezentantoj de loka publika vivo kaj eksterlandaj gastoj. Posttagmeze post la diskutado de la konferencanoj estis prezentita kiel plej grava punkto de programo - pritrakti aferon de Tutŝtata Konsulta Kolegio Esperantista en ĈSR, kies celo estas kunordigi la agadon de ĉiuj Esperanto rondetoj en Ĉeĥoslovakio kaj helpi diversmaniere al tiuj, kiuj ne havas ankoraŭ sufiĉe da spertoj aŭ kiuj nur laboron ekkomencas. La kreo de TKKE estis unuanime aprobita kaj kiel prezidanto de ĉi tiu kolegia estis elektita s-ano Jos. Vítek el Praha, sekretaria s-ano Miloš Rudolf el Olomouc. Estis kreitaj tri ĉefaj sekcioj de la kolegio. Sekcio por pacmovado - gvidanto R. Burda el Plzeň, sekcio por organizaj aferoj s-ano prof. Jos. Kožený el Kutná Hora, sekcio por lingvaj aferoj kaj instruado s-ano Dr Pumpr el Praha. Oficiala organo de TKKE estas bulteno "Nia Spegulo" eldonata en Trenčín.

Kiel tute aparta sekcio de TKKE estas Junulata fako, kies gvidanto estas a-ano Mařík el Praha. La centra organo por junulara movado estas plu bulteno "Tagiĝo".

La konferenco en Otrokovice havas grandan signifon per tio, ke denove post kelkvara paŭzo kunvenis reprezentantoj de Esp. grupoj. Tamen estas necese aldoni, ke ankaŭ dua tiu ĉi kriza periodo post la likvido de EAĈSR la Esp. vivo en ĈSR ne ĉesis, male Esperanto - Junulara movado floris kaj ĉiujare kunvokis la junajn gesamideanojn el tuta respubliko, kiu en la tutŝtata konferenco de Junularo komune pritraktis la pluan agadon kaj junularan movadon.

Ni esperas, ke la decidoj, kiujn la konferenco akceptis (kreo de TKKE) alportos novajn sukcesojn de la Esp. movado en ĈSR. Tamen ankoraŭ ni aldonu, ke esperantistaro ne ekkonis dum la konferenco la programon de TKKE kaj ĝian labormanieron. Ni kredu, ke ne restos nur ĉe elekto de novaj funkciuloj, sed ke tiuj nun eklaboros per novaj rimedoj, tiel, ke ĉiu esperantisto en ĈSR ekkonu ke TKKE ne estas nur estraro surpapere, sed kapablas ankaŭ helpi al la disvastigo de Esperanto movado en nia lando.

Jak

Kelkaj sugestoj al la tutŝtata

JUNULARA KUNVENO.

Tiu ĉi jare la tutŝtata junulara kunveno estia kunvokita al Otrokovice, eluzinte la aranĝon de la I-a Tutŝtata konferenco de Esperantistoj.

La kunveno komencis sabate la 9-an de julio je la 16-a horo posttagmeze kaj ĉeestis ĝin 85 gesamideanoj, inter ili delegitoj de junularaj grupoj en ĈSR kaj el eksterlandaj gastoj partoprenis ĝin samideano Haudebine el Francio.

Ĉar la tempo dediĉita por tiu ĉi kunveno estie tre mallonga, estis necese agi rapide, sen longaj paroloj. Ĉefan raporton havis ĝistiam ĉefdelegito de Junularo s-ano Kuzník, kiu preparolis la rezultojn de Junularaj grupoj. Li notis ke la raporto pri la Esp. movado estis publikigita en lasta numero de Tagiĝo, tial estis nenecese plu tion preparoli. Tial li dediĉis sian referaton al tio, kiel estis la Esp. Junularo organizita kaj kiaj mankoj okazis en la laboro de la unuopaj funkciuloj de la Junulara movado. Li diris, ke ĝisnuna sistemo de nia laboro jam ne plu konvenas, ĉefe la konkurso taksata per poentoj, kaj estas necese trovi novan metodon kaj per ĝi reaktivigi la tutan Esperanto Junularon, ankaŭ junajn homojn tute izolitajn.

Fine de lia parolo li diris: Junularo de dormis, estis multaj junaj homoj, kiuj entuziasme laboris, kaj ĉefe en nove kreantaj junularaj grupoj ili faris sian pioniran laboron, kiu estas ofte tre laciga, postulanta grandan oferemon kaj ofte eĉ ne alportanta la atendantajn sukcesojn. Nin ne povas fortimigi ankaŭ la malsukcesoj kaj ni devas obstine denove komenci por provi alimaniere pluan nian laboron por Esperanto. Kiel en la grupo oni devas serĉi diversajn labormanierojn, tiel ankaŭ ni kiel la tuto - la Junularo en ĈSR - devas serĉi metodon plej bone nin organizi por atingi la plej bonajn sukcesojn. Ni devas eviti la erarojn kiujn ni faris en estinteco kaj el tiuj ni devas lerni.

Se ni dum la tempo ne sukcesas ni ne perdu tuj la kapon, sed ni komencu denove kaj obstine antaŭen.

Poste s-ano el Slovakio raportis pri la stato de Junulara movado en tiu ĉi parto de nia respubliko. Raporton pri la organiza laboro kaj pri la junularaj entreprenoj dum pasinta jaro donis s-ano Kočvara. Al la plej bonaj junularaj grupoj en jaro 1954-55 preparis Centrejo la libropremiojn. Ankaŭ premiita estis plej aktiva regiona delegito s-ano J. Werner. Dum tiu ĉi kunveno estis elektita nova ĉefdelegito de Junularo a-ano Jaroslav MAŘÍK el Praha, kiu tiun ĉi funkcion akceptis.

La pluan organizan dividon de komitato kaj organizajn ŝanĝojn en nia laboro estis decidite pro nesufiĉe da tempo pritrakti post la kunveno, ĉefe dum la 3-a etapo de Somera Esperanto Tendaro ĉe valdigo Vranov, kio ankaŭ okazis.

Post la diskuto, kie belajn vortojn al ĉeĥoslovaka Esperanto-junularo diris s-anino Haudebine el Francio estis la kunveno fermita per la rezolucio, kiun la partoprenintoj unuanime akceptis:

1. Direkti nian laboron al plifortigo de tutmonda paco per pli proksima kunlaboro kun MEM kaj lokaj packomitatoj.
2. Pliperfektigi nian lingvan nivelon:
 - a. per respondeca preparo de kunvenprogramoj. En ĉiu kunveno havi prilingvan duonhoreton.
 - b. instigi membrojn legi Esp. librojn kiuj estas prunteblaj precipe en migranta biblioteko en Praha kaj en ceteraj.
 - c. kulturi en kluboj kantadon, recitadon kaj teatraĵojn.
3. Organizati publikajn esperantokursojn sur bazo de porpaca movado, propagandi Esp. en Uzinaj kluboj, Klerigaj konsilantaroj kaj lernejoj.
4. Per utiligo de lastaj spertoj plibonigi kaj disvolvi kunlaboron de unuopaj grupoj precipe ĉeĥaj kaj slovakaj pere de reciprokaj vizitoj, regionaj kunvenoj kaj cirkuleroj. Jak

Redakcio de TAGIĜO esprimas siajn bondezirojn al ges-anoj Zdeněk Škvrna kaj Olga Ondrušová, kiuj anoncis al ni sian geedziĝon.

Resuma referato de *KULTURA DELEGITO* de Esperanto-Junularo en ĈSR.

Pri mia tutjara laboro mi koncize povas diri tion:

Mia tasko estis organizi kulturen vivon de niaj grupoj. Kiamaniere mi volis plenumi tiun ĉi problemon: mi publikigis en Tagiĝo alvokon, kiu, koncize dirite, postulis jenon: kulturaj entreprenoj kaj kultura vivo ĝenerale estas gravaj elementoj de nia agado. Junularaj grupoj tial interŝanĝu siajn spertojn tiurilatajn, interŝanĝu novajn tradukojn kaj originalojn, interŝanĝu teatraĵetojn, poemojn, kantojn kaj ludojn - simple ĉion, kio vigligas niajn kunvenojn kaj ceterajn entreprenojn. Kultura delegito estu centro, kiu kolektu novaĵojn kaj distribuu ilin inter grupojn, kiuj ilin postulos. Tiamaniere mi celis forigi nelaŭdindan kutimon de niaj grupoj, kie oni ludas kaj kantas dum longaj jaroj konstante la samon.

Rezulto de la entrepreno estis vere "ĝojiga"! Eĉ ne unu respondo venis. Ŝajnis, ke ĉio estas en plej bona ordo, ke neniu bezonas helpon kaj konsilon. Bedaŭrinde en multaj Junular-grupoj mi dum jaro konstatis ĝuste la malon.

Tamen, por ne nur plendi, mi devas substreki la fakton, ke en kelkaj Junularaj rondetoj nivelo de la kultura laboro altiĝis, ke ili atingis eĉ merititan laŭdon kaj admiron de maljunaj esperantistoj.

Mi menciuj Junularon en Brno, kiu posedas elstaran lokon en kultura laboro inter ni. Ilia teatra kolektivo surprizas. Kaj kio estas ĉefa afero: Ili mem tradukas kaj verkas! Junulara kolektivo en Brno estu por ni modelo de bone organizata kultura laboro.

Kultura laboro disvolviĝas ĝojige ankaŭ en Praha, kvankam iom alimaniere ol tiu en Brno. Ĉi tie ni havas kelkajn bonajn unuopulojn. Mi menciis s-anon Mráz, kies trafikaj tradukoj aperis en Tagiĝo kaj porblindula organo "La Aŭroro". Aparte ĝojiga afero estas, ke eĉ sur muzikkampo aperis kapabla samideano, nome R.Kudla. Por Junularo en Praha li adaptas naciajn kantojn. Li estas ankaŭ aŭtoro de kelkaj originalverkoj.

Kiel detale aspektas la situacio en ceteraj grupoj mi ne povas diri, ĉar ties delegitoj ne opiniis grava sendi siajn informojn al Centrejo.

Parto de mia agadkampo estis ankaŭ t.n. "Literatura paĝo" en Tagiĝo. Mi kompilis por grupaj bezonoj koncizajn portretojn de niaj plej konataj kaj ŝatataj verkistoj. Samtempe mi aldonis tabelon de iliaj verkoj kun mencio pri leĝindeco de la libroj. Se almenaŭ unu s-ano el ĉiu grupo estis instigita al tralego de Esperantaj libroj – mi kuraĝus diri, ke mi plenumis la taskon. Pri organizado de kultura programo por nia tutŝtata konferenco mi ne intencas paroli, ĉar tio estis nur bagatelo.

Permesu ankoraŭ kelkajn vortojn pri nia centra cirkulero TAGIĜO: Kiel vi scias, ĝi aperadas en Opava neregule, laŭbezone, redaktata de s-ano Kuzník. Eldonkvanto estas 250 ekzempleroj, el tiu nur duono estas ĝuste abonita. Ŝajnas al mi, ke la cirkulero ne plenumas sian taskon! Kia estas la tasko de Tagiĝo? Ĝi servas kiel organiza ligilo inter niaj grupoj anstataŭante regulan gazeton, ĝi alportas novaĵojn el la mondo kaj ĈSR, ĝi estas tribuno de niaj grupoj kie oni solvas kaj ĝeneralajn kaj delikatajn problemojn de nia vivo. Koncize dirite: ĝi estas instrua, konsila kaj kleriga ilo de la junulara movado. Kaj kial ĝi sian taskon ne plenumas?

Por karakterizi nunan staton, ni devus antaŭ supre menciita tasko meti vortojn "devas"! Jes, ĝi devas servi kiel...ĝi devas solvi...ĝi devas speguli interesojn de nia anaro! Jes, devas - sed ĉu fakte ĝi povas fari tion? La cirkulero estas malmulte legata. Ĝiaj fidelaj legantoj estas kelkaj funkciuloj, - ceteraj nur konstatas, ke aperia nova numero, ofte eĉ tion ne! Jen la esenco de la afero. La cirkulero ne povas plenumi sian taskon ne havante kunlaboron, apogon kaj subtenon de sia abonantaro. Kiel solvi malfacilaĵojn de grupa laboro se mankas kontakto inter la grupo kaj centrejo, kiel skribi pri sukcesoj atingitaj, se ne ekzistas homo en la grupo, kiu komunikus ilin al la redaktoro!?

Sed kia estas la kaŭzo, ke oni ne legas la cirkuleron?

Unuj diras: troa okupiteco, aliaj: neinteresa enhavo! Pri la unuaj mi prefere ne parolu! Sed ni atentu pri la dua motivo. Cirkulero tiel ampleksa kiel Tagiĝo, nepre bezonas kunlaborantojn, por ke la enhavo estu varia. Kelkaj alvokoj tiurilataj en Tagiĝo montriĝis senrezultaj. Tial ni ne postulu de la redaktoro, kiu estas cetere superŝutita per laboro en sia oficejo, miraklojn! Imagu nur, ke kompili materialon, skribi, korekti, multobligi kaj ekspedi 12 aŭ 14 paĝan cirkuleron ne estas infanludo. Tion konsciu ankaŭ tiuj, kiuj plendas pro preseraroj en la cirkulero. Laŭ mia opinio enhavo de opaj numeroj de Tagiĝo estas sufiĉe varia, sed la redaktoro nepre bezonas intiman kontakton kun la legantaro por ekkoni iliajn dezirojn. Sed troa komforto ne permesas al ili preni plumon kaj skribi: tiuj kaj tiuj artikolaĵoj nepre devas malaperi el Tagiĝo, ni volas legi pri tio kaj tio - sed stranga hazardo: similan leteron ni ankoraŭ neniam ricevis. Ĉu tio estas pruvo, ke la cirkulero estas perfekta - respondu donu vi mem! Tia inerteco, pri kiu mi ĵus parolis, doloras, karaj amikoj. Doloras des pli, ke ĝi regas en junularaj vicoj, kiuj proverbe estas agemaj kaj entuziasmaj - kaj efektive estis tiaj ankoraŭ antaŭ nelonge:

Junularo post kongreso en Brno 1950 ekpaŝis sian propran vojon kun efektive juneca flamo kaj aŭdaco! Leteroj kaj sciigoj, kiujn tiam Centrejo ricevis plenaj de sana bonhumoro, kiu helpis venki eĉ plej malfavorajn cirkonstancojn. La movado tiam estis afero de ĉiuj junaj homoj, ĉiuj interesiĝis pri la evoluo, ĉiuj fervore studis la lingvon kaj penis, ke ilia grupo estu la plej bona. En Rožnov estis "baptitaj" unuaj junaj instruistoj, kiuj enportis freŝan spiriton en la rondetojn. Regulan gazeton anstataŭis cirkuleroj, kiuj multigis kaj kreskis kiel fungoj. La cirkuleroj estis tiam senpacience atendataj kaj - tion mi plej forte akcentata - ili estis ankaŭ legataj! Sed la tempo pasis.

La unua entuziasmoondo malaltiĝis - ekkomencis periodo de trankvila laboro. Tio estis natura fenomeno, oni atendis ĝin kaj ne estis surprizitaj pro ĝi.

Niaj grupoj edukis novajn funkciulojn, kiuj jam ne konis la varman periodon de fondklopodo, kiuj ne travivis akrajn disputojn inter junaj, kaj maljunaj esperantistoj, pri problemoj,

kiu tiam nomigis "izolemo". Hodiaŭ ĝi estas preskaŭ ĉie solvita por ambaŭflanka kontento. En tiu tempo aperis unuaj signoj de la stagno inter nia junularo. Kiuj estas la kaŭzoj?

Nia Junulara movado, same kiel movado esperantista ĝenerale, sekvante ideojn de Zamenhof, penas enkonduki en la mondon lingvon neŭtralan, servantan al facila interkompreniĝo de la nacioj, al interŝanĝado de kulturaj kaj spiritaj valoroj. Ke tio ne estas utopio, sed tute realigebla ideo, tion antaŭ tempo koafirmis UNESKO organizo en Montevideo.

Ĉiu granda afero kreskis el malfacila kaj malgranda komenco, kutime ne ricevante apogon de la superaj ŝtatorganoj. Ĉiu nobla ideo postulis komence grandajn oferojn de siaj unuaj defendantoj kaj batalantoj, sed alportis benatan frukton al generacio venonta.

Ĉu nia vojo, nia peno kaj batalo ne similas tiujn, kiuj komence ankaŭ ŝajnis esti utopio malespera kaj kies rezultatoj estas hodiaŭ bazo de la vivo de kulturo homaro. Ekzemplojn el tekniko kaj politiko vi trovos multajn.

Ni naskiĝis en 20-a jarcento. Nia destino ne estas plene ĝui avantaĝojn, kiujn alportos ĝenerale uzo de la lingvo internacia. Nia destino estas por ĉi tiu fina celo honeste batali. Sceptikuloj ridetas... Sed mi diras, ke en niaj vicoj ne estas loko por ili,- cetere, sceptikuloj kreskas inter ni el malfortaj karakteroj, kiujn post unua ekflamo ekkaptas timo el longa vojo antaŭ ni kuŝanta. Ili formortas por nia movado. Ili estas "velkintaj folioj", laŭ la vortoj de dro Zamenhof.

Kaj strange: ju pli forte la vento blovas kaj la velkintajn foliojn deŝiras de la trunko de movado - - des pli firme kaj decide staras nia afero, kiu repurigata "forton pli sreĉan akiras"! nia ĉiama devizo pri kvantito kaj kvalito estas denove tiamaniere pravigata.

Por nia laboro ni fakte bezonas grandan dozon de idealismo: - jes, mono ja ne estas rekompenco por nia peno! - male ofte malkomprenemo, rideto eĉ insulto. Kaj tio nin ofte konfuzigas, precipe nin junajn! Venas kompreneblaj momentoj de ekdubo kaj konfuzo!- sed vireca estas persistemo kaj pacienco!

Ne estas laboro, kiu donas plenan kontentigon al ni, sed ĝiaj bonaj rezultoj alportas al la animo harmonion. Ankaŭ en nia movado estas la afero sama. Ellerninte la lingvon ni volus vidi praktikajn sukcesojn, uzeblecon, rezultojn -...

Jes, ni povas koreapondi kun eksterlando - sed ne ĉiuj emas tion praktiki! Ni ĉiuj sopiras viziti fremdajn landojn kaj mem konvinkiĝi ke Esperantujo ne estas ĥimero, sed realeco; - ni ĉiuj sopiras viziti kongresojn kaj partopreni internacian kulturan vivon ĝenerale. - Vi ĉiuj scias ke nun tio ne eblas.

Kaj ĉi tie kuŝas esenca kaŭzo, kial multaj gesamideanoj ekmalinteresiĝas pri Esperanto. Ili ne tuj povas uzi siajn sciojn en eksterlando, ili ne tuj povas vojaĝi tra fremdaj landoj... kaj rezulte estus malprudente daŭrigi la laboron! Se vi demandas ilin ili respondas: ni ne estas malamikoj de Esperanto, sed ni atendas ĝis kiam ĝi estos oficialigita kaj pli vaste uzata!!! Ni ne juĝu tiajn homojn tro severe. Ni konsciuj, ke en iliaj vejnoj pulsas maltrankvila juna sango - tamen iom pli prudenta vidpunkto al ili ne malutilus.

Evidentas, ke la oficialigo de internacia lingvo ne falos el ĉielo! - ke oni devas ĉiun paŝon tiudirekten perbatali! La sinteno de tiaj ges-anoj - kiuj forlasas siajn gekolegojn en tempo plej urĝa - estas milde dirite, almenaŭ malkuraĝa!

Sed kion faru ni ceteraj? Multaj sukcesoj de nia movado en mondskala atingitaj, UNESKO-decido en Montevideo kaj pluraj signoj en internacia forumo supozigas ke niaj esperoj ne estos trompitaj.

Dume ni paciencu! Same kiel ĉiu soldato por finbatalo devas esti bonege preparita, ankaŭ ni, antaŭ decida tago zorgeme preparu nin! Ni unue estu spertaj eperantistoj el vidpunkto lingva, due ni konatiĝu kun historio kaj spirita vivo de nia movado de post la komenco! —

Kiamaniere? Mi rekomendas al vi Esperantan literaturon! Ĝi konatigos vin kun komenco de nia movado, kiu estis nekompareble pli malfacila ol la nia, ĝi rakontos al vi pri neestingigebla entuziasmo de unuaj adeptoj. Grandaj pensoj de Zamenhof montros al vi esencon de nia movado. Viaj teoriaj duboj klariĝos, kiam vi enprofundiĝos en poeziriĉaĵojn de nia lingvo... Vi konstatos perfektecon, belsonon kaj esprimkapablon. Vi fariĝos neatentite sperta gramatikisto, ĉar bonaj libroj ne povas ne postlasi en vi konsekvencojn. Kaj krome vin ekkaptos delikata sento de Interna Ideo,

kiu vibras tra ĉiuj bonaj E-verkoj. Libroj fariĝos viaj plej fidelaj amikoj, ili montros al vi vojon kaj helpos trovi vian homan lokon!

Ĉiu konenco estas malfacila, diras proverbo. Ankaŭ ami librojn oni lernas iom post iom. Unua libro kiun vi prenos en manon, decidas ofte, ĉu vi prenos aliajn, aŭ forĵetos ĝin (kaj kompreneble ceterajn) por longa tempo! Tion konsciante, ni eldonas en Tagiĝo liston de la verkoj, kun noto pri legindeco. La utilo el legado de Esperanto-libroj kiun vi konstatos je vi mem - surprizos vin.

Je la fino permesu ankoraŭ kelkajn vortojn:

Rigardante nian hodiaŭan situacion ni devas konstati, ke ekzistas kelkaj ĝeneralaj principoj kiuj kaŭzas nunan stagnon en nia junularmovado. Se ni rigardas unuopajn grupojn ni tamen devas konfesi, ke decida elemento de ĝia laboro aŭ sukcesa aŭ malukcesa estas loka gvidanto de la grupo. De li kutime dependas, kigrade estas la krizo venkata. Li estas animo, kies aktiveco flamigas ceterajn anojn, li kreas amikan rondon kaj agrablan medion. Memkempreneble li devas esti helpata de ceteraj anoj. Kiel ekzemplon mi nomu Regionan delegiton el regiono Brno, Jihlava kaj Gottwaldov. Plejparte lia merito estas, ke en tieaj grupoj la menciitaj problemoj ne akriĝis, sed la laboro trankvile estas daŭrigata.

La plenumo de la funkcioj postulas ofte nekredeblan paciencon, bonhumoron kaj - tempon. Malnovepoka saĝulo Plautus diras: Pacienco estas plej bona kuracilo kontraŭ ĉiu turmento, - jes, kontraŭ turmento ĉiuspeca - ankaŭ la nia!

Pacienco estas hodiaŭ plej necesa virto de ni ĉiuj. Ĝi helpas al ni venki nunan ioman krizon de nia junularmovado. Naturaj leĝoj instruas nin, ke post vintro venas printempo, post nuboj aperas radiantanta suno! Same ĉe ni.

Post ekfloro venis stagno - sed neniu povas nin konvinki, ke ĝi daŭros longe. Juna entuziasmo, kiu ankoraŭ ne estingiĝis, venkos ĝin.

Mi kredas, ke venontjare dum tutŝtata konferenco ni ĝoje konstatos kreskon kaj brilajn sukcesojn.

Ili estos rezultoj de via tutjara fervora laboro - kaj por tiu mi deziras al vi multe da pacienco.

Vlastimil Novobilský
kultura delegito

Malgranda kalendaro de la plej gravaj JUNULARAJ ENTREPRENOJ.

La jam kutima ĉiujara Interbabilado tiu ĉi jara sub titolo: Esperanto seminario "Per Esperanto al Paco" aranĝos de 24.10 ĝis 30.10.55 junulara grupo en Ostrava.

La signifo de tiu ĉi entrepreno ĉiam kreskas. Dum pasintaj jaroj oni krom gaja programo solvis ankaŭ multajn organizajn problemojn.

Programo:

24.10.55 - Kio estas Esperanto kaj ĝiaj celoj. s-ano Janouš Karel

25.10.55 - Fragmentoj el fremdlanda korespondaĵo, Junularo Ostrava

26.10.55 - Marksismo kaj Esp.,- s.Dr Mohapl

27.10.55,- UNESKO - Per Esp. al Paco - a.Frantl Ant.

28.10.55 - Eltiraĵoj el Esp. literaturo

s. Kořínek kaj Rudolf Miloš.

29.10.55 - kultura konkurso de Esp.rondetoj - Čermák

30.10.55 - Junulara laborkunveno /matene/ - s. Mařík

Aliĝilojn por partopreni la seminarion ni almetas. Ni atentigas partopreni almenaŭ sabatan kaj dimanĉan programon, kiu estas destinita ĉefe por Esp. Junularo. Ĉiujn pluajn informojn petu ĉe s.Adámek Lad. Poruba u Ostravy, Hornická ĉ. 304. - Eluzu grandan 50% fervojrabaton. - Ĝis revido en Ostrava dum interbabilado.

Ostrava JUNULARO

NOVAĴOJ:

Esperanto rondeto de SOR en Bratislava. - De kelkaj flankoj aŭdiĝis zorgoplenaj demandoj, kio estas pri la Esp. rondeto de Slov.odbor.rada en Bratislava. Mi povas sciigi surbaze de komuniko de s. Pavel Rosa, post liaj multaj diskutoj kun SOR, ke "SOR ne plu malhelpos. Nuna evoluo ĉe SOR ŝajnas sufiĉe favora". La problemo tamen ankoraŭ ne estas solvita kaj la Bratislavanojn atendas peniga laboro. Kiu povas helpi en ilia situacio per raporto pri atingita sukceso en sia loko k.s., adresu ĝin al s. Rosa, Bratislava, Vlčkova 46. Mařík.

Maskobalo kun grava JUNULARA KONFERENCO


okazos en Brno februare. Kiu pasintjare partoprenis la balon scias, ke tiu ĉi bonege preparita entrepreno ne bezonas rekomendon. Ankaŭ por maskobalo kaj konferenco 50% fervojrabato estas garantiota.

Nikolaa vespereto.

komence de decembro aranĝos Junularo en Praha Nikolaan vespereton. Krom riĉa kultura programo, amika kunesto kaj danco. 50% fervojrabato versimile akirebla. Precizaj datumoj estos ĝustatempe anocitaj.

Sistemo de nova organizo de Ĉeĥoslovaka Junularo

Por niaj junularaj grupoj ni alportas la novan skemon de la komitato de Ĉeĥoslovaka E-Junularo.



Dum la konferenco en Otrokovice kiel ĉefdelegito estis elektita: s-ano Jar. Mařík, Malá Štěpánská 9, Praha II.

Redaktoro de Junulara bulteno: "Tagiĝo" - Kuzník Jar. Rooseveltova 17, Opava.

Gvidanto de literatura sekcio enhavanta ekzamenan komisionon kaj arkivon kaj dokumentadon estas samideano Vlastimil Novobilský, Praha III, Ujezd 11.

Sekcion de Studenta E-Movado gvidas s-ano Werner Jan, Helceletova 16, Brno.

Regionaj delegitoj:

Meza kaj norda Bohemio: Novotný Vladimír, Praha II, Třída pol.věznů 10 - Restante.

Okcidenta Bohemio: Hořejší Josef, Plzeň, Domov Zvil H 1, Čechova ul.

Suda Bohemio: Křivánek Libor, Písek, Zborovská 1332

Orienta Bohemio: Franc Karel, Pardubice, Okrouhlík 811

Tuta Moravio: Kočvara Drahomír, Ostrava VIII, Kamenec 251/3.

La regionaj delegitoj estas dum la jaro laŭ eblecoj alelektitaj, ĉefe ni bezonas apartan delegiton por regiono: Brno-Jihlava-Gottwaldov, kaj antaŭ delegiton por regiono Olomouc-Přerov. Ĝis tiu tempo praktikos funkcion de regiona delegito por tuta Moravio samideano Kočvara el Ostrava.

Mia ĝisnuna organiza sistemo en formo de tiel nomata "Konkurso pri scio" ne plu konvenis, ĉar li preferis nur la fortajn grupojn kaj la nove fonditaj ankoraŭ malfortaj, tute ne povis okupi pli elstaran lokon en la konkurso. Ankaŭ la izolitaj junaj samideanoj tute ne povis por tiu ĉi konkurso aliĝi.

Ni forlasas la ĝisnunan poentadon de la agado de grupoj. Dum la jaro okazos konkursoj, sed diversaj kun speciala destino, ekzemple por junaj verkistoj, poetoj,...Konkurso por la plej sukcesa E-kurso, por varbado de novaj anoj, por kompilo de iuspeca programo ktp. Ĝi estas farata tiel ke

antaŭ unuopuloj povos partopreni ĝin. En tiu ĉi numero de Tagiĝo ni jam donas ekzemplon kiamaniere ni imagas tiun ĉi laboron. La devo de lokaj delegitoj restas la samaj kiel antaŭa. Ili forsendas la raporton pri la agado de la grupoj dum pasinta monato almenaŭ unu semajnon post ĝia fino al sia regiona delegito. Ili raportas pri la programoj en la kunvenoj, pri la sukcesoj aŭ malsukcesoj, kaj pri ĉiuj okazaĵoj en la grupo. La Reg. delegito kompilos tiujn ĉi raportojn kaj en formo de malgranda cirkulero dissendos ĝia al la grupoj en la regiono kaj unu kopion al ĉefdelegito, kiu prilaboros la resuman raporton el la cirkuleroj de ĉiuj regionaj delegitoj el la respubliko, kaj tiu raporto estas publikita en plej proksima numero de Tagiĝo.

La unuopaj raportoj pri la vigleco aŭ malvigleco de la agado donos al ni post unu jaro supervidon de la poresperanta laboro en la grupoj. Komprenoble plej klaran bildon pri la vigleco de la grupo donos al ni la partopreno en la diversaj mallongtempaj konkursoj anoncotaj en nia cirkulero Tagiĝo. Ni ekvidos viglecon de unuopuloj kaj de tutaj grupoj.

Tasko de Reg.del. estas koni siajn grupojn en la regiono kaj skribi en la cirkuleroj veron pri la situacio en la grupoj. RD instigas grupojn al vigla agado.

La lingvaj kategorioj restas kiel ĝis nun. Nome kat. A, B, C, D.

Kategorion A povas ricevi ĉiuj komencantoj en la grupo, kiuj vizitadas ĝin kaj kiuj havas almenaŭ la elementan kurson de Esperanto. Ĝi ankoraŭ ne signifas por ni kvaliton, sed reprezentas nur kvantiton, kiu povas dum jaro kreski (nove gajnitaj anoj de grupo) aŭ malkreski (foriro de tiuj ĉi ankoraŭ ne tute konvinkitaj esp-istoj)

Kategorio B reprezentas por ni jam ioman kvaliton. Tiun ĉi kategorion povas ricevi ĉiu grupano, kiu montris jam pli profundan scion de Esperanto, konas jam iom konversacii Esperante kaj konas la ĉefajn fundamentojn el Esperanta literaturo kaj historio. Tiu ĉi kategorio estas jam atingebla post la ekzameno kiun faras iu ano de loka grupo kun almenaŭ jam atingita kategorio C. Por garantii la iom saman nivelon de tiuj ĉi B-anoj la ekzamena komisiono de Centrejo ellaboros la demandaron kiu servos kiel modelo por tiuj ĉi ekzamenoj.

Kategorion C povas ricevi jam nur tiuj s-anoj, kiuj jam sufiĉe bona regas la lingvon, kaj submetis sin al la ekzameno aŭ en iu el someraj Esp. tendaroj, aŭ povas tiun ĉi ekzamenon fari ano kun kategorio D, dum la ĉeesto de iu komisiita samideano el alia Junulara grupo. Tiu ĉi kategorio donas al ni jam sufiĉe altan kvaliton kaj antaŭsupozas jam la esperantiston, kiu en E-vivo ankaŭ laboros kaj restos. La ekzameno devas esti farata respondece kaj la ekzamenito ricevos post ĝi diplomon de kat. C. Ankaŭ demandaron por ekzamenoj de kat. C la ekz.komis. ĉe Centrejo ellaboros.

Kategorion D ricevos nur tiu samideano, kiu kapablas jam instrui la lingvon en kursoj kaj faris ekzamenon antaŭ la komisiono aprobata de Centrejo. Pri la kvalitoj de tiu ĉi persono ne povas jam esti iaj duboj. La ekzameno okazos eble nur unufoje dum jaro (en Someraj Esp. Tendaroj aŭ dum okazoj antaŭe anoncitaj de Centrejo)

Lokaj grupoj raportos pri la stato de lingvaj kategorioj de siaj anoj nur unufoje en la jaro. Al certa dato diseendos Centrejo demando-liston en kiu krom aliaj demandoj respondos la grupo la staton de kat. A kaj B nur en nombro, pri la kategorioj C kaj D donos la precizan nomliston.

Tio estis nur skiza supervido de nia nova organiza sistemo de laboro kaj en venonta numero de Tagiĝo ni mencios ankoraŭ plujajn aldonojn al tiu ĉi afero.

C E N T R E J O .

esperantský tábor na Vranovské přehradě.

13. srpna skončil ve Chvalaticích na Vranovské přehradě Letní esperantský tábor, uspořádaný Domem osvěty v Třebíči. Po šest týdnů stanový tábor a jeho okolí žilo čilým ruchem mladých lidí, kterých se zde vystřídalo na půldruhého sta. Dopoledne studovali esperanto, dějiny jeho hnutí a esperantskou literaturu, odpoledne věnovali rekreaci a večery zpěvu, přednáškám a hrám v kouzelném prostředí u táborového ohně.

První běh byl vyhrazen pro ty nejmladší, školní mládež, zatím co v druhém a třetím běhu se konaly kursy pro pokročilé a učitelé esperanta, zakončené táborovými zkouškami a slavnostním rozdáním vysvědčení. Vyučovali m.j. prof. Th. Killian, V. Echtner, Dr.Kočvara, Jar. Pařík, Vl.Novobilský, J.Cink a J.Werner. Vedoucím tábora byl P. Sittauer.

Účastníci kursů budou dlouho vzpomínat na milé prostředí tábora a vzpomínky jím budou posilou v jejich další práci.

Mařík Jaroslav

OPINIOJ pri SET de ĝiaj partoprenintoj.

J. Mařík:

Mi kredas, ke ni povas esti kontentaj pri la rezultoj de SET 1955. La nivelo estis bona, pluraj novaj samideanoj surprizie per sia eminenteco. Tamen ŝajnas, ke en la ĵusa SET estis pli da distraĵo ol necese kaj ke la nivelo de scioj en SET 1954 estis iom pli alta. En la venonta oni ne enlasu homon, por kiu la partopreno en lecionoj estas nur afero flanka aŭ eĉ ĝena kaj kiu influas malbona la studenton de aliaj. Montriĝis, ke studtekstoj por kursanoj, kvankam malmultaj, multe helpis atingi la menciitan nivelon kaj ke venonte ili estu disponeblaj nepre por ĉiu studanto. Ankaŭ ioma plibonigo en la kondiĉoj de loĝado kaj nutraĵ-provizado estas dezirinda. - Tamen kuraĝon!!

Dr Stan. Kamarýt: (el la letero al s-ano Mařík)

..ankaŭ nombro 150 en Chvalatice estas edificanta. Kaj listo de instruistaro des pli, ĉar enestas novaj nomoj rolontaj nepre en estonteco.

Jan Werner:

Koncerne al kursa nivelo de SET-55 (3-a etapo) mi volas laŭde tuŝi la kursanaron, kiu dediĉis tiom da feria tempo kaj zeno al diligenta studado. Kaj kurso C kaj la D, ambaŭ min kontentigis en sia tuto. Kelkaj neglektis teorion de la gramatiko, sed parolante kaj skribante ili estis lingve perfektaj.

D-kursanoj, niaj novbakitaj instruistoj de Esp., kelkfoje stumblis, precipe en skribaj tradukoj. Malgraŭ tio pluraj montris bonan senton por stilistiko. En instruaj provlecionoj en B-kurso ili montris vere instruistan talenton.

Kiel mankon mi konsideras: La konversacia C-kurso preskaŭ ne estis konversacia. - D-kursanoj preskaŭ ne ricevis konsilojn pri aranĝo kaj gvido de Esperanto kurso.

Vlast. Novobilský:

Bonaj rezultoj de ĉi-jara SET superas kelkajn mankojn kiujn ni renkontis. Plej alte mi taksas la fakton, ke niaj grupoj ricevis novajn kapablajn ĝeinstruistojn, kiuj certe ne nur pendigos sian diplomon sur muron, sed aktive partoprenos edukon kaj organizan laboron de nia Junular-movado.

Vladimír Novotný:

Manko de instruado: ne ekzistis lernolibroj aŭ multobligitaj tekstoj. Kelkaj estis disponeblaj, sed malmultaj. La lernolokoj ankaŭ ne estis ĉiam konvenaj, ekzemple en tendoj estis malmulte da spaco (dua pluvo) kaj en naturo ni estis ĝenitaj de preterirantoj kaj najbaroj, kiuj en ĉirkaŭaĵo de tendaro estis multaj. Laŭdinde niaj instruistoj multe helpis al ni. Ili estis pretaj al nia dispono eĉ krom instruhoroj kaj ripetadis kun ni la trastuditajn aferojn. Ni povas esti tre dankemaj al ili, ĉar en mallonga tempo ni ellernis multon.

Kočvara Drahomír:

Mi estas konvinkita, ke SET estas la plej altvalora sistemo por vastigi kaj pliperfektigi ne nur lingvan, sed ankaŭ organizan flankon de Junularo. Ni bezonas nur plivastigi tiun instrusistemon. Venont-jare estu ne unu tendaro por tuta ĈSR, sed ĉie, kie por tio estos la kondiĉoj!

Lad. Adámek:

Sincere mi devas diri, ke nunjare en SET multaj aferoj estis bonege aranĝitaj. Tamen ne plaĉis al mi: loko, pro vojo, kiu dispartigis la tendaron en duonon. flago de pureco, ĉar mi nur malofte ĝin ricevis, kaj la agago de Sankta Petro, kiu sendadis sur niajn kapojn multe da pluvo. El plaĉaj aferoj: Divido je grupetoj, instruado, nokta gardado banado, kaj ĉefe vesperaj kunsidoj ĉe tendarfajro, ĉar ili kapablas plifortigi kolektivon de gejunuloj el tuta respubliko. Ni povas deziri al ni nur pli multe da tiaj aranĝoj.

s. Březina: (fragmento el lia letero al ni)

...Aliĝon al SET mi sendis kun iom miksitaj sentoj kaj kun certa timeto. Ĉu vi demandas kial? Vi scias, ke mi estas blindulo kaj blinduloj ordinare estas en samilaj kazoj konsiderataj kiel evitinda balasto kaj ofte efikas kiel embarasigo. Aliajn malhelpojn ne estas necese aludi.

Post iom komplika vojaĝo ni atingis tendaron. Ĉi tie ni estis bonakceptitaj de kelkaj samideanoj. La bonvenigo estis tiel bela kaj sincera, ke de ĉi tiu momento ĉiu timeto kaj necerteco tute forlasis min.

Ho kiel ĝoja kaj serena estis la tempo, kiun mi travivis inter vi karaj samideanoj. Ĝis nun en neniu socio mi estis tiel kontenta kaj feliĉa kiel inter vi miaj verdaj geamikoj. Mi ne troigas, se mi diras ke belega medio en SET dum dekkvar tagoj plene kompensis al mi perditan lumon.

Mi ne trovas konvenajn vortojn por esprimi miajn sentojn de admiro kaj dankemo al ĉiuj instruistoj de la kursoj. Ili estis komplezemaj kaj sinoferemaj ne nur dum instruotempo, sed ankaŭ ĉiam pretaj helpi en sia ripoztempo. Laŭ mia opinio, nivelo de la instruado estis tiel alta, ke ĝi povus kontentigi eĉ plej altajn pretendojn.

Specialan dankon meritas s-anoj el Třebíč, sur kies ŝultroj kuŝis la tuta pezo de ekonomia organizado de la tendaro. Ilia klopodo ne restis sen brila rezulto. Malgraŭ tio, ke ĉio estis preskaŭ perfekta, estas unu afero, kiu laŭ mia opinio meritis plibonigon. Sendube la ĉefa celo de SET estas plibonigo kaj firmigo de lingvaj scioj de la partoprenantoj. Do ni venonte pli bone eluzu raran okazon kaj parolu dum nia tendaro nur Esperante. Nunjare oni ne faris tion tre principe. La tendaro estis por ni malavara fonto de pura ĝojo kaj nova forto por plua poresperanta laboro. Bona afero ree sukcesis. "INTERNA IDEO" de nia lingvo donis denove dolĉajn fruktojn.

Venontjare: Ĝis revido!

Gratulon gesamideanoj!

Finiĝis Kvara Somera Esperanto-Tendaro en naturo, ĉi jare okazinta en Chvalatice, apud valdigo Vranov. Dekkvar belegaj tagoj, kiujn ne povis difekti eĉ nefavora vetero kun ofta pluvduŝo, pasis tro rapide.

Tri tendara kuraĵoj B, C, D devis kelkfoje venki veteromalfacilaĵojn. Tamen fina rikolto estis riĉa kaj ĝojiga, - ĝojiga des pli, ĉar ĉi jare nia junularo ricevis ok novajn instruistojn, kapablajn instrui en kursoj. - La ekzamenoj estis severaj. La diplomoj estas efektive merititaj. Mi kuraĝas aserti, ke ili egalas tiujn de estinta EAĈSR, se ni komparas amplekson de la trastudita materialo. Juna entuziasmo helpis al la kandidatoj venki amason da lernendaj faktoj kaj sukcese fari ekzamenojn.

La ekzamenkomisiono gratulas al la novaj instruistoj kaj deziras al ili fortan volon kaj paciencon sur vojo de la edukado de nia nova verda generacio.

Jen niaj novaj instruistoj, kiuj fariĝis kapablaj instrui en kursoj, kun sukceso:

Anna Veselá, anino de Junulargrupo Praha - eminenta,

Marta Lorková, anino de Jun.grupo Brno - eminenta

Vlad.Novotný, ano de Jun.grupo Praha - eminenta

Andreo Valjan, ano de Esp.grupo Galanta - eminenta

Věra Kořínková, anino de Jun.grupo Brno - tre bona

L. Adámek, ano de Jun.grupo Ostrava - bona

Věra Podhradská, anino de Jun.grupo Brno - bona

Jar.Novotná, anino de Jun. grupo Brno - bona

Podhradská, Novotná kaj Valjan ne ricevis ankoraŭ diplomojn, ĉar ili nun finverkas sian hejman taskon. Ankaŭ kun du ceteraj kursoj ni estis kontentaj. En kurso B estis plej bona esperantistino: Jana Borkovcová, el junulara grupo en Brno.

En C kurso eminentiĝis samideanoj; Frant.Březina el Žďár n/Sáz, kaj Pavel Tichý el Jun.grupo Svitavy.

Nia danko apartenas kompreneble ankaŭ al ĉiuj ceteraj gesamideanoj, kiuj penis atingi plej bonan rezulton. Al ĉiuj frekventintoj de la 4-a SET 55 ni kore premas la manojn kun vortoj:

Ĝis la revido en SET-1956

Centrejo kaj
ekzamenkomisiono.

Jaroslav Mařík, fenomeno rara,
de l' junularo verda bonmentor',
post Konferenco ĝia ĉefpastor',
somera instruisto populara!

Mi vidas lin ĉe fajro samovara
studi dum pluv' en tendo kun fervor',
Jaroslav Mařík, fenomeno rara,
de l' junularo verda bonmentor'!

Kiam eksonis lasta ton' fanfara,
mutiĝis simfoni', ekvelkis flor',
meriton aprezis la orator':
leonstatuon ricevis nia kara
Jaroslav Mařík, fenomeno rara! .

- A t a i -



Novajoj kompilitaj de J. Mařík

V SSSR založena esperantská společnost.

V ĉervnu t.r. oznámil do Prahy E.Bokarev, vědecký pracovník Jazykovědného ústavu Sovětské akademie věd v Moskvě, že bude v brzké budoucnosti založena Sovětská všesvazová esperantská společnost (Sovetunia Esperanto-Societo) v rámci Akademi věd SSR s pobočkami v různých místech. Podle této zprávy různé sovětské instituce projevíly zájem o esperanto a zaujaly velmi příznivý postoj k úmyslu založit Společnost. Dokazuje to též usnesení Sovětské akademie věd ze dne 18.června t.r., podle něhož E.Bokarev byl stanoven oficiálním delegátem na I. celostátní konferenci čs. esperantistů obránců míru v Otrokovicích.

Svaz esperantistů v Polsku, jemuž úřady právě přidělily nové krásné místnosti pro sídlo jeho Ústředního výboru, oznámil do Prahy, že podle právě došlé zprávy z Moskvy Sovětská všesvazová esp. společnost byla oficiálně založena. Setkání esperantistů na varšavském V. festivalu mládeže a studentstva, kterého se zúčastnilo 120 mladých lidí z 15 zemí, došel již pozdrav této sovětské Společnosti, který vyvolal bouři nadšení, stejně jako pozdrav studentů Lomonosovy university v Moskvě.

Esperanto na Lomonosovĉ universitĉ.

Od novĉho ŝkolnĉho roku zahĉjĉ ĉinnost na Lomonosovĉ universitĉ v Moskvĉ krouĉek pro mezinĉrodnĉj jazyk esperanto. /informo de Mila Bokareva pere de Bulgario/

Zĉjĉzd do Karlovĉjch Varĉ.

EK Praha uspořĉdĉ 25. zĉrĉjĉ zĉjĉzd autobusem do Karlovĉjch Varĉ. Na programu je prohlĉdka mĉsta a setkĉnĉj s mĉstnĉjmĉ samideĉny, a kulturnĉj vložkou.

Nova rondeto.

Esperanto-rondeto ĉe Osvĉtovĉ beseda en Poprad estis oficiale fondita en julio. Komenciĝis kurso de Esperanto, kiun gvidas laŭ Cseh-metodo M. Zvara.

Slovakia esperantista laborkonferenco,

okazinta 14.8. en Svit, prĉtraktis la metodojn por pli aktiva kunlaboro de la slovakaj Esperanto-rondetoj kaj por plivigliĝo de la movado en Slovakio. Oni diskutis pri la eblecoj aranĝi en 1956 kolecion de Esperanto en subtrata urbeto. Diskuto montris la neceson meti la kontaktojn kun la ĉeĥaj esperantistoj sur bazon multe pli firman kaj oni esprimis la esperon je efika helpo de la ĉeĥaj samideanoj.

La EK en Praha estis reprezentata de A. Slanina.

Salutoj el eksterlando.

Profitinte de la okazo ni transdonas al la ĉeĥoslovakaj esperantistoj la salutojn, kiuj venis en la lastaj tagoj pere de la Esperantisia Klubo en Praha:

de Raymond Schwartz el Parizo, de Gaston Waringhien /Francio/, D-ro Rĉgulo Pĉrez /Kanariaj Insuloj/, D-ro Edmond Privat /Svislando/, Retto Rosseti /Britlando/, Madelaine Haudebine /Francio-Danlando/ el la 40-a universala Kongreso de Esperanto en Bologna.

Historio de la ĉs. Esperanto movado estas verkata!

Ĉiuj iom pli junaj esperantistoj sentas absolutan mankon de helpilo, per kiu ili povus instruiĝi pri la historio de la esperantista movado en Ĉeĥoslovakio, sed plej multe la instruantoj, kiuj en Esperantaj seminarioj en kursoj prelegas pri tiu temo.

Ni danku al nia estimata samideano D-ro Stanislav Kamarĉt, ke li tre afable plenumis la iniciaton de la junulara Somera Esperantista Tendaro 1954 kaj ke tiu ĉi, certe unu el la plej kompetentaj ekspertoj pri tiu temo kiu staris ĉe lulilo de la Esperanto-movado inter ĉeĥoj, finverkas nun sufiĉe detalan kaj ampleksan historion de la E-movado en la teritorio de Ĉeĥoslovaka Respubliko. Nur tiu, kiu jam legis la ankoraŭ ne pretan manuskripton, povas aprezi la signifon de tiu ĉi faro!

Tre mallonga historio "Esperanto kaj Poezio", de Zamenhof ĝis la Skota Skolo, kun atento al la ĉeĥaj E-poetoj, estis multobligita por la bezonoj de SET 55. Aŭtoro estas Jiřĉ Kořĉnek. Verko enhavas 16 paĝojn A4. Ĝi estas mendebla ĉe s-ano Werner Jan, Helceletova 16 Brno.

Esperanto menciata en monografio pri Zdenĉk Nejedlĉ.


En la antaŭ nelonge aperinta broŝuro pri la vivo kaj verko de elstara reprezentanto de la samtempa ĉeĥoslovaka kulturo, vicprezidanto de la ĉeĥoslovaka registaro, akademiano Zdenĉk Nejedlĉ /titolita "Zdenĉk Nejedlĉ", eld. Kniha n.p./ estas menciata sur la paĝo 35 la Esperanta traduko de la Lerneja Reformo en Ĉeĥoslovakio 1949.

En la libreto troviĝas detala listo de la verkoj de Nejedlĉ kun ĉiuj eldon-datoj. Laŭ tio oni povas supozi, ke la eldonejo ne sciis antaŭ la redakto pri la II-a eldono de la "Reformo" en 1950.

Bulteno de Bulgara Asocio de Esp.

Bulgara Esp. asocio denove eldonas Esp. cirkuleron. Petu ĝin ĉe Bulgara Esp. Asocio, Sofio, bulv. Stalin 40, Bulgario.

Junulara rond' vortoj Th. Kilian



En la junulara rond', estas mia tuta mond',

estas mia tuta koro, mia sola ĝoj'.

/:Ha ho, ha hoj, mia sola ĝoj':/

Al la junulara rond', celas mia rekta voj',
post la ĉiutaga peno post la taglabor'.

/:Ha ho, ha hoj, post la taglabor':/

Kun la junulara rond' mi laboras sen ripoz',
por la paco de l' homaro, de la tuta mond'.

/:Ha ho, ha hoj, de la tuta mond':/

Pri la konkursoj ĝenerale

kaj pri la hodiaŭa aparte...

Ni forlasis ĝisnunan formon de la konkursoj inter junularaj grupoj. Evidentiĝis, ke longdaŭra konkurso fine lacigas siajn organizantojn, lacigas fine sĉ vastan anaron ĝin partoprenantan. Tio rezultas el la regulo, ke ne laboro plene kontentigas homon, sed nur ĝiaj rezultoj. Rezultoj de nia estinta konkurso estis videblaj nur post unu jaro, dum Tutŝtata Konferenco, kiam oni proklamis plej bonan grupon, kiu en la konkurso venkis. Sed tuta jaro estas tro longa tempo! Ni decidiĝis do alimaniere. Nia Centrejo nepre bezonas informojn pri la stato de niaj grupoj. Resuman bildon pri la aktiveco oni bone ricevas laŭ nombra partopreno en konkursoj, en esperantista vino ĝenerale!

"Granda konkurso", numero 1, estas ĉi sube represita. Konkursos inter si kaj tutaj grupoj kaj unuopuloj. Temoj de la konkursoj varios. Por hodiaŭ ni elektis poemon de J. Baghy: Milita fablo, kiu servos kiel bazo de nia entrepreno. Temo de la poemo estas proksima al ni ĉiuj, kiuj travivis teruraĵojn de la mondmilito. Via tasko estas jena:

Traleĝi la poemon kaj iom mediti. Poste preni plumon kaj skribi artikoleton, kie vi uzos ideojn el la poemo, priskribos viajn proprajn travivaĵojn en la milito kaj fine kondamnos ĉiujn militojn, kiuj naskas nur mizeron kaj larmojn. Via artikoleto povas soni lirike, epike, politika aŭ filantropie! Tio ĉio estas kompreneble nur skeleto, kiun kompletigi vi povos per via fantazio tute libervole. Komuna restas nur ĉefa temo: batalo kontraŭ militoj, pro motivoj...-, kiuj ŝajnas al vi plej gravaj!

Viajn opiniojn sendu al adreso de la kultura delegito: Vlast. Novobilský, Praha 3, Újezd 11.
Jen la poemo:

Milita fablo

Julio Baghy

En la sunbril', dum maja mateno,
tremante sub kares' de l' vent',
sur silkpetal' de blanka jasmeno
du rosoj sidas en silent ...

Flustras l' unua: "Estas mi rido,
ĝojlarmo brila de patrin',
kiu el mortoj cent de l' milito
la filon vidas nun ĉe l' sin .."

Plendas la dua: "Kial vi ridas?
Okuloj blindaj naskis min...
Venis la fil', sed plu li ne vidas
vizaĝon karan de l' patrin'..."

Suna radi' de l' maja mateno
la gemojn por la di-juvel'
prenas per kis' for de l' jasmeno
kaj portas ilin al ĉiel'...

Junularo en Praha volas konkursi speciale kun gesamideanoj el Přerov! Kiel vi respondos Přerov-anoj?

La saman informon ni ricevis el Brno, kiu instigas Junularon en Plzeň al akra batalo - kaj el Opava, kiu volas provi siajn fortojn, konkursante kun Junularo en Pardubice!!

La konkurso daŭros unu monaton, /ĝis la 15-a de oktobro/. Rezultojn anoncos Tagiĝo Nro 28. Plej sukcesan artikolon ni eventuale represos!

SUKCESON AL ĈIUJ!

LA UNUA ATOMA ELEKTREJO.

La mallonga populara priskribo pri la fundamentoj de atoma energio de Dro Rud. Pawlik.

Li dividis la temon je kelkaj demandoj, nome: Kio estas uranio, kio estas energio, Kio estas atomoj, kio estas atoma energio, La atoma bombo, kaj atoma elektrejo.

Pro ĝia interesa kaj instrua enhavo ni rekomendaa mendi ĝin ĉe s-ano Ján Lamačka, Pod Sokolicami 1675, Trenčín. /Unu peco Kčs 2,20/

Ĉiuj grupoj atentu!

Finiĝas somera periodo de libertempo. Flamo de nia verda agado en lokaj grupoj moderiĝis pro foresto de multaj gesamideanoj. La vivo bolis nur en Somera Esperanto-Tendaro apud Vranov-lago, kie dum 6 semajnoj lernis kaj refreŝiĝis ĉirkaŭ 150 geesperantistoj. Sed finiĝis eĉ tiuj 6 semajnoj kaj tendarloko, tiom viva, sílentiĝis. Frekventintoj de la kursoj revenis hejmen kun nova entuziasmo kaj aktiveco. Junulara vivo devos aŭtune denove ekflagri, klel ĉiam pasinte!

Prezidantoj de la grupoj certe jam pritraktis kun siaj estroj /uzinaj, en Kulturaj domoj ktp./ aŭtunan agadon, havas jam garantiitan sian kunvenejon ktp...

Restas nur anonci precizan tagon de la unua kunveno kaj komenciĝos serio de Junularaj kunsidoj, kiu finiĝos venontjare, antaŭ Tutŝtata konferenco 1956. La kunvenoj havos sian programon, kiu, estante pli aŭ malpli sukcesa kaj interesa, kaŭzos konsekvence pli malpli vivan

agadon de koncera grupo. Kompili, elekti kaj prezenti ĝustan programon estas ofte malfacila problemo, sed ĉiam dependanta de homo, kiu ĝin preparas!
Ni donas ĉi-sube kelkajn sugestojn kiel aspektu viaj unuaj grupaj kunvenoj:

Kunveno 1 -a programo

Pritaksu laboron de pasintjara grupa komitato. Aparte trarigardu tiun de loka delegito; esploru ĉu:

viaj kunvenoj okazadis regule,

viaj lecionoj havis efektive Esperantan programon,

loka delegito regule informis vin pri novaĵoj el nia movado,

via delegito sendadis siajn raportojn al reg. delegito.

Se vi devos konstati, ke via loka delegito ne plenumis siajn devojn, nepre elektu delegiton alian, ĉar via grupo liamerite nur vegetis kaj minacis al ĝi nepre disfalo!

Tio estas via unua paŝo: elekto de la loka delegito. Laŭ lokaj cirkonstancoj elektu ceterajn membrojn de la komitato: prezidanton, kasiston ktp.

Atentigo: Ĉi tiun elekton faru certe dum unua kunveno. Baldaŭ vi ricevos "Informliston" de nove elektita Centrejo, kiu esploras nunan staton de nia movado. Demando koncerne komitaton estos ja ĉefa, kiun vi devos respondi!

Fine mi ankoraŭfoje ripetas: funkcion de loka delegito donu nur al homo plene konscianta siajn devojn, al homo, kiu efektive povos esti animo de la grupo kaj inde ĝin reprezenti!

Tio estu ĉefa parto de via unua postferia kunveno! Dua parto de la programo estu dediĉita al informoj pri Somera Esperanto Tendaro kaj ceteraj entreprenoj. Ellernu kanton "En la junulara rond", kiu estis tre populara en la tendaro. En lasta parto de la programo vi pridiskutu aŭtunajn kursojn por komencantoj. Krome vi faru seriozan planon de la agado por tuta jaro. La programon fermu per la kanto: "Ni Esperanta Junularo".

KUNVENO 2 -a programo

Por bone fari iun laboron ni bezonas havi bonan humoron. Ĝin kreas komunaj kantoj. Tial post malfermo de via 2a kunveno kantu "En la junulara rond", kiun vi ellernis pasintfoje. Aldonu ankoraŭ 2 kantojn, - kaj sufiĉas!

Nun rekte al la programo:

Unue loka delegito informas pri novaĵoj:

a/ en la mondo, b/ en nia movado, c/ en propra grupo.

Li demandu pri tio, kiom da ges. partoprenas la konkurson publikigitan en lasta numero de Tagiĝo.

Se neniu, /kaj tio estas verŝajna!!/ li instigas kaj mem ĝin partoprenas.

Komenciĝas gramatika horeto: unu sperta samideano gvidas ĝin. Elektu taŭgan metodon! Por komencantoj ni havas bonan lernolibron de Killian, por progresintoj ni uzu tiun de Seppik: "La tuta Esperanto", de Fruictier: "Kompleta Esperanto" aŭ de prof. Kožený: "Gramatiko de Esperanto".

Evitu la metodon praktikatan en "klasikaj lernejoj!" Sekvas duonhoreto literatura kaj historia. El via biblioteko prenu libron pri kiu vi legis en Tagiĝo, aŭ aŭdis en SET. Tralegu fragmentojn kaj diru koncize ion pri la aŭtoro. Se mankas al vi libroj, petu ilin el "Migranta biblioteko de Pacdefendanto" /adreso: Alois Zmeškal, Celetná 2, Praha I/, aŭ el biblioteko de la grupo en Praha /adreso:

J. Šustr, Dlouhá tř. 10, Praha I/, kiuj afable pruntos ilin al vi.

Por tiu ĉi duonhoreto uzu ankaŭ "Literaturan paĝon" kaj "Ellerni" kiuj aperadis en Tagiĝo.

Lasta parto de la programo estu ludoj kaj kantoj. Da ili vi havas certe abundan provizon. Se ne, tuj skribu al najbara Junularo kaj tiu kompleze plenumos vian peton.

Kunveno 3-a programo

enkonduka kanto,

informoj el la mondo kaj movado,

hodiaŭ envicigu 10-15 minutan prelegon pri Esperanto. Titoloj povas esti variaj:

Esperanto servanta al homaro,

Esperanto kaj tutmonda paco,

Esperanto kaj ĝia Interna ideo,

Ĉu Esperanto aŭ naciaj lingvoj...

Sed la temo ne davas esti ekskluzive "verda"! Parolu pri Varsovia festivalo kaj pri plej diversaj interesaĵoj!

Laŭ kalendaro vi konstatas, ke proksimiĝas datreveno de la Majstro. Tio pensigos vin prepari indan programon. Ekzistas eĉ pluraj aliaj tagoj, kiuj meritas esti honore festataj.

Ĉu ankaŭ ĉi-jare vi ĉion fuŝplenumos per ia seka, legata prelego?? "Ne, ĉi jare ni faros ion eksterordinaran!" estu via respondo. Sed kion? Tre taŭga kaj efika estas prezento de teatraĵo. Ĝi havas kelkajn bonajn ecojn pro kiuj mi rekomendas ĝin al vi. Se vi ne havas materialon – demandu la delegiton en Brno aŭ kulturen delegiton en Praha!

Sed: al preparo de la programa nepre ne dediĉu tutan kunvenon!

Mi skizis antaŭ vi programojn de kelkaj viaj kunvenoj. Nur pacienco, bona volo, kaj freŝa vervo estas bezonendaj! Nepre elĵetu el viaj kunvenoj enuan grizecon!

Geamikoj! nivelo de la grupo estas bildo de via laboro. Neniam laciĝu, sed ĉiam vigle partoprenu verdan vivon de skalo de la tuta respubliko. Ni estu unu granda familio, ni helpu unu la alian, ni kulturu solidarecon!

Vervon, energion, paciencon kaj ĝojigajn sukcesojn deziras al vi Via

Van

Portagiĝa „VERKULO“

Skribi por "Tagiĝo" estas vere ne produktiva laboro. Jen rigardu: mi iris deziri al mia plej ŝatata amiko bonan digeston antaŭ la noktoripozo kaj li – nedankemulo - tre trankvile postulis de mi "iun aventureton" por supre nomita organo de Junularo. Mi bona komprenas - honesta homo evitas similan oferton de malproksimeco. Mi meditas: kion faras konataj verkistoj kaj poetoj? Eble por iliaj grandaj verkoj estas paĝoj de "Tagiĝo" tro malvastaj /ankaŭ oni asertas, ke ili jam al junularo ne apartenas – do, grava kaŭzo. Malgraŭ tio - mi havas larĝan dorson - mi toleros ĉion.

Alveninte hejmen mi serĉas kraĵonon por skribi. Netrovebla. Ekscitiĝinta mi ĉirkaŭkuradas loĝejon. En antaŭĉambro mi sukcesis piedpuŝiĝi je tapiŝo kaj falante mi surterigis ankaŭ la vesthokaron. Dank' al Dio, vundita estas nur mi! Feliĉhazarde elfalis el poŝo de iu jako kraĵono. Situacio savita! Mi povas komenci!

Plej grava afero estas elpensi belan, belsonoran kaj efikan pseŭdonimon. Ne pro timo de la legantoj, ĉar ili ĉiam sendube ekkonoa skribinton (mi havas spertojn!), sed estas certe tro enua legi sub ĉiuj artikoloj en kiu ajn numero la saman nomon. Ĉu ne? Do, mi pripensas. Ekzemple taŭgus: Litera-Turisto, aŭ Ver-Kulo, Po-Emulo aŭ Kolo-Fono, ankaŭ eblas fremdaj pseŭdonimoj kiel Piere, Kšandy-má, Ferenc Mlatipysk, Drkoalaviĉ Koktalenko kaj multaj aliaj. (En lasta tempo mi uzis tiom da diversaj nomoj, ke mi jam entute ne scias, kiu estas mia ĝusta propra nomo. Hodiaŭan kaŝnomon mi elektia rapidtempe dum unu nokto (dormi mi ne povis pro peristito).

Temoj estas diversaj. Mi povas libere elekti. Tiukaŭze mi trarigardas gazetojn. Mian atentecon allogas malgranda sciigo:

Intervjuo kun zizeloj

Nia informanto antaŭ ne longe vizitis elkajn esperantlingve parolantajn zizelojn kaj demandis ilin:

Demando: "Kial vi ne partoprenas nunan esp. vivon?"

Resp.: "Ankoraŭ ne estas sufiĉe taŭga tempo."

Dem.: "Ĉu vi volas denove iam labori en Esp. movado?"

Reap.: "Povas esti, sed mi preferas ankoraŭ iomete atendi ĝis la situacio pliboniĝos. Superflue mi nenien puŝas la nazon. Ni estas elito (eble el-lito, rim. de red.) kaj postulas preparitan vojon. Tamen vi niajn nomojn ekaŭdos!"

Mi pensas, ke ni ilin konas jam nun. Mi serĉas ankoraŭ plu la temon. Ion pri junularo. Nenio! Teruro! Pri junularo eĉ ne linio. Konsternita mi demetas gazetojn.

Ĝus mi rememoras tendaron. Homoj el diversaj lokoj. Mi skribos nur pri kio ili parolis. Feliĉa penso! Do en Brno dum kunvenoj ili parolas pri ĉio ajn, sed aferojn pri Esp. ili ne forgesas preterlasi.

Přerov-anoj fondigis fiŝrondeton, por ke ili ne devu respondi je demandoj pri ilia agado.

Olomouc diras al ĉio, kion ĝi mem ne elpensis, ke tio estas malbona. Nenion pli.

Ostravanaj junuloj rapide serĉas fianĉinojn, por povi siajn agadpromesojn finigi per vortoj: Edzino-fino!...

Al Opava grupo oni devas aĉeti vekhorloĝon alie ĝi neniam vekigiĝos.

Kaj en tuta Bohemio? Ŝajnas, ke ĉiuj, krom etaj esceptoj atendas ĝis fondiĝo de nova EAĈSR. Sed ĉu povas iu kredi, ke ili laboros poste pli ol nun?

Senĉese Nurmi

Nauĉte se dobře překládat.

Otiskujeme dnes úryvek z knihy V. Ř e z á ĉ e "Kluci, hurá za ním" a očekáváme, že se o vzorný překlad pokusí nejen všichni s-áni letošního SETU, ale také Jarka Rybová a Milada Vondroušková z Brna, Josef Hořejší a Mirek Kulíšek z Plzně, Květa Jůrková z Přerova, Vlastimil Kočvara, Jindra Musálková z Opavy, Pavel Tichý ze Svitav, Stáňa Kratochvílová z Prahy a mnoho dalších.

Deset překladů je tedy již jistých. Ty ostatní určitě přijdou bez vybízení. Svoje práce zašlete na adr.: Vlast. Novobilský, Újezd 11, Praha III, do 15.října t.r.

Upozorňujeme zároveň vedoucí skupin, aby ty samideány, kteří nedostávají Tagiĝo, seznámili s textem na svých schůzkách, aby i tito se mohli zúčastnit svými příspěvky.

TEXT:

Bylo ujednáno, že Sirka půjde sám a Val noha se Zrzkem že ho doprovodí ke Kopanině, jednak aby mu cesta veseleji uběhla, jednak aby mu byli nablízku, kdyby mu bylo třeba jejich pomoci. Tak to tedy bylo ujednáno. Nesměli by však být na světě profesori, tatínkové a jiné takové překážky, jež příroda staví do cesty spravedlivému naplnění klukovských plánů. Proti Valnohovi se spikli profesor matematiky a tatínek. Profesor matematiky napařil třídu cvičení na dvě stránky, a pane, mastné příklady, na ty aby byl nejméně Tycho de Brahe nebo Archimedes. Valnoha si řekl, že cvičení napíše až po večeři, nebo je od někoho obškrábne před vyučováním. Valnohův tatínek měl zvědavou náladu a když se Valnoha chtěl po obědě vytrátit z domova, byl zapleten do křížového výsledku, který skončil moudrou, ale nepříjemnou prűpovídkou:

— Napřed povinnost a potom zábava.

MIÁDEŽI, A TEĎ DO PRÁCE !!!

NOVAĴOJ.

Al kunveno de kultur-referentoj de la Centra Nacia Komitato de la Ĉefurbo Praha kaj de ĉiuj Distriktaj Naciaj Komitatoj en Praha, kiu okazos en proksimaj tagoj, estis invitita Josef Vitek. Li reprezentos en la kunveno la Tutŝtatan Konsultan Kolegion Esperantistan, kies prezidanto li estas. TKKE estas elektita reprezenta organo de la Esp. interes-rondetoj ĉe la Uzinaj Kluboj de la Revolucia Sindikata Movado /ROH/ kaj ĉe la Klerigaj Kunularoj de la Naciaj Komitatoj.

/raporto de Mařík Jar./

Kia estis SET 1955

El la tria kurso

Videblaj partoprenintoj: proskimume 45

Aŭdeblaj partoprenintoj: precize 251

Matenmanĝo: nun pano seka, alie ne ŝmirita. Spite oni asertas, ke pro malsato neniu mortis.

De tempo al tempo: pluvegis kaj akvo leviĝis, pluvegis kaj akvo.....

Produktado de sunradioj restis profunde sub la plano. (Ni proponas ŝanĝi la veterreferenton!)

Ordo ĉi tie regis modela. Ŝerifo Pavel mem eĉ dum la lasta tago ne estis kapabla trovi sian propran ladmanĝujon!

Unu el knabinoj el Brno (iu ĉevalrajdistino) provis eltrinki vranovan lagon. Feliĉe ŝi ne sukcesis kaj ni povis plue bani nin.

"Kiel plej rapide trapiki la pneŭmatikon" estas prelego kompilita je bazo de tendaraj spertoj de fama motociklisto Dr. Čvarako. Mendu ĝin, tuj!

La plej taŭga tempo por purigi piedojn en la rivereto estas noktomezo. Detalajn informojn petu ĉe Kík aŭ Van.

Severaj ekzamenoj el literaturo: "Kiu estas samideano Kořínek?" - "Li estas patro de Věrka Kořínková."

Kiamaniere akiri tre bonan rezulton ĉe ekzamenoj sen lernado, konsilos senpage Midar Alduk (kaj eble ankaŭ iu alia?)

Novan metodon por varbado de novaj anoj eltrovis brnaniĝoj, ĉar sekve de ilia agado post malmultaj tagoj komencis en tendaro vigla fremdula homsvarmado.

"Ho, ne estas ĉi tie kio min ĝojigus!" ekĝemetis s-ano Mařík, rimarkinte fuĝecon de la lasta kandelo el sia tendo.

Laŭ nevenkebla skermisto Jarda havas pli granda duono de ĉeestintoj cerbon, kiel unu kilogramo da lumbrikoj.

Unuan lokon en artraĵo sur biciklo gajnis Staňa, kiu preskaŭ sen peno eksidiĝis eĉ kun veturilo en mezon de ĉarma kotakvo.

La tendara volejbala trupo ĉiujare pliboniĝas. Ĉi jare ĝi kun gastoj malvenkis nur 1 : 3!

Unu el ekzamenitoj konatigis nin kun nova tradukverko de s-ano dr. Pumpr. Ĝi nomiĝas: "Bapto de sankta Vavřinec".

Oni aŭdis, ke ĉiuj uzintoj de tendara Tobruk (la necesejo) komune provos suprengrimpi Mt-Everest.

Ĉe la tendarfajroj oni kutime provadis, kiu plej frue ekdormos.

Sanitarista servado funkciis tre bone. Por naŭzigi al malsanuloj la komfortan kuŝadon, ili manĝigis ilin per ĉiuj haveblaj medikamentoj. Unu trafitan savis la malsanulejo.

ASO

Admonoj - konsiloj

Laŭ certa informo havas nia Junular-movado pluan rezervon de freŝaj aktivaj helpantoj en novaj instruistoj - absolventoj de ĉi jara SET.

Ni konsideras superflua admoni ekzemple Andrej Valjan aŭ Marta Lorková, ke ili ne forgesu uzi siajn sciojn praktike eĉ se rilatas je Tagiĝo. Por Věra Kořínková, Jarka Novotná kaj Věra Podhradská ni proponas gvidadon de "Infan-anguleto", kiun ni komencos presigi en venonta numero (kompreneble nur se ili konsentos). Al Vlád'a Novotný ni rekomendas fakon de ama liriko. Ankaŭ je verkoj de Anička Veselá kaj Láďa Adámek ni estas scivolemaj kaj senpacience atendas ilin. Do, ne misuzu nian fideman atendadon!

KATA UNGEGO

ANONCETOJ

Nia redakcio ricevis amason da anoncetoj, el kiuj hodiaŭ ni represas jenajn:

* Virinamantoj salutas Iksodan operaciejon kaj proponas rendezuon. Skribu al redakcio de Tagiĝo sub mallongigo "AM OfE Bro" numero 77. La redakcio senpage peros ĉion deziratan!

* Litero kaj Turo demandas mastrojn el "Ĉe verda botelo", ĉu eblas nokte viziti la entreprenaĉon, kaj ne suferi pro sekeco? Respondon sendu pere de Tagiĝo, sed singarde, por ke TOP ne eksuspektu ion!

*Du elegantaj, freŝaj, beltaliaj, altstaturaj, nigraharaj, modernaj kaj aŭdacaj junuloj interesiĝas intense pri fraŭlinoj, kiuj kaŝas sin sub pseŭdonimo RANETOJ. Siajn fotojn kaj detalajn informojn sendu al redakcio de Tagiĝo!

*Doktoro ankoraŭ juna varme volas konatiĝi kun ĝemeloj, kiuj vivas sub signo SIAMO kaj solvi (eble per operacio) ilian priplorindan staton. Ĝemeloj, ĝemeloj skribu nepre al la redakcio kaj sur vian koverton surskribu: Siamo - problemo, signo: motorciklo, Jawa 250 ccm.

* Gardisto ĉe LITERA TURO serĉas novan okupon. Liaj scioj estas eminentaj en zoologio. Speciala fako - ranoj, ankoraŭ pli bone RANETOJ. Skribu al Tagiĝo je mallongigo .."Van".

* Atentu, atentu, atentu!!!

Alvoko al inoj aŭ similaj estaĵoj 17 -- 30 jaraj. Bubo preskaŭ kvaronjarcentaĝa, iomete pli grandstatura, laŭ opinio de familianoj ne tro bela, de siaj konfidantoj profundriverence salutata, serĉas ian inon aŭ similan estaĵon, kiu volonte akceptus taskon kuraci lian nedifineblan "kor-malsanon".

Diagnozo: Mi ĉion vidas „tre nigre“, patrino min ĵetis „trans ferdekon“, mia koro batas maltrankvile, ĉefe kiam mi renkontas belan knabinon, miaj okuloj estas larmoplenaj, kiam mi nur sola sidas vespere sub lumanta luno kalkulante steletojn.

Proponeblan kuracilon bonvolu sendi pere de redakcio sub signo „al aplapla“

Grava peto

En tendaro iu prunteprenis de s-ano Novobilský Esp.-ĉeĥan vortaron kaj ĝin forgesis redoni. Ni petegas la kulpulon afable forsendi ĝin al adreso: Vlast. Novobilský, Praha III, Újezd 11.

Tagiĝo: desegnis s. Honzek, Bohanus, Kyselý, Kočvara, Škutová.